## Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 14-an de marto 2019 per Skype.

(Protokolo aprobita la 25an de marto 2019.)

**Partoprenis:**
Anne Karin Bondhus en Bryne
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Lars Sandbakk en Sandnes
Ulf Lunde en Os
Mario Machlik en Tromsø
Amelie Matt en Tromsø ekde punkto 4
Judith Parelie Abrahamsen en Trondheim por respondi al demandoj pri la legaco Uhlen (sub punkto 3) kaj pri la elekto de nova presejo (punkto 5)

### 0. Tagordo
Aprobita.

### 1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 18-an de februaro
Aprobita.

### 2. Ekonomio

### 3. Jarraporto, jarkalkulo 2018
La estraro komune ekredaktis la jarraporton dum la interkonsiliĝo, per Google Docs.
Nia celo estas, ke ĝi  estu preta je la 25a de marto.

Anne Karin Bondhus klopodos labori pri la jarkalkulo se ŝi sentas sin sufiĉe forta.

### 4. Landa Kongreso 2019
Amelie preparis dokumenton pri la Landa Kongreso, kun aliĝilo, programo, prezoj, tranoktado kaj aliaj praktikaj informoj.
La kotizo estos 300 kr, kio inkluzivos ekskurson, du lunĉojn en la lernejo,  kaj festenan manĝon en sabato.

Ankoraŭ mankas decidoj pri antaŭ- kaj post-kongreso.

## Landa kongreso en Tromsø

## 01.-02.06.2019

**Tromsø Esperantoklubo kore invitas vin al venonta landa kongreso en nia bela urbo. Kvankvam ni nomiĝas la norda lumo, vi ne povus travivi ĝin, sed la meznoktan sunon. Ĉi tie vi trovas pli da informoj pri la aranĝo.**

**Nia kongresejo**

Landa kunveno okazos en la lernejo *NTG* en Stadionvegen 9. Tie ni kunvenos kaj manĝos lunĉon.

Piede estas nur 10-15min for de la urbocentro.

Vidu vojon de hotelo al kongresejo ĉi tie

**Proponita programo**

| **Vendredo, 31.05.** | **Sabato, 01.06.** | **Dimanĉo, 02.06.** |
|---|---|---|
| | 10-12<br>jarkunveno | 10-12<br>jarkunveno |
| | 12-13<br>Lunĉo | 12-13<br>lunĉo |
| | 13-15<br>jarkunveno | 13-14<br>jarkunveno |
| Antaŭkongresa ekskurzo:<br>Ŝipveturado<br>Komencas je la 16a horo | 15-16<br>Jarkunveno NJE | |
| | 16.30-18<br>Ekskurso al muzeo en la urbocentro | |
| | 19.30<br>festmanĝo | |

**5. Nova presejo por Norvega Esperantisto**

La presejo en Trondheim presas bone, sed ili ĉiam frustrige prokrastas la sendadon de pretaj gazetoj al ni.

En decembro ili eĉ donis la presitajn gazetojn de N-ro 6/2018 al fremda ulo, kaj devis presi novajn al ni. Tial tiu numero malfruis eĉ pli ol kutime.

Pro tio NEL nun volas ŝanĝi al alia presejo.

Judith Parelie Abrahamsen informis ke nia unua elekto (plej malmultekosta) estas Land Trykkeri en Dokka.
Dua alternativo estas Trykk Partner en Oslo (en bicikla distanco de Esperantonio).

**6. Dato por la venonta estrara interkonsiliĝo**
Vidu plej malsupre.

**7. Eventualaĵoj**

a) Douglas Draper petas helpon pri redaktado de Norvega Esperantisto.
La estraro komencis diskuton pri la historio kaj estonteco de Norvega Esperantisto.

b) Bona novaĵo: Okazas kurso en Skien fare de nova esperantisto Henrik Håndlykken.

c) Facebook-paĝoj pri NEL: Nenio okazas. Indas vigligi ilin. Pluraj membroj devus havi administrajn rajtojn tie.

**La interkonsiliĝo daŭris 20:00h - 21:50h.**
**La venonta interkonsiliĝo okazos la 25-an de marto 2019, je 20:00h.**

**Raportis Ulf Lunde**